

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Nina Vinnikova
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

2000

redakcie — KOMENCANTO en perspektivo — literatur-
historiaj paĝoj — svedaj kristnaskaj tradicioj — fabeleto
amuze-distre — filozofie --- anekdotoj — korespondu!
Abonu KOMENCANTOn por 2001 !

7

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Rcvuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.



Kazaĵ amikoj!

Tiu ĉi numero de KOMENCANTO atingos vin en la tagoj, kiam ni jam vivos en la agrabla atendo de proksimiĝanta Kzistnasko.

Tial vi zenkontos en nia gazeto, krom la tradiciaj rubrikoj, kelkajn materialojn, dediĉitajn al tiu ĝoja evento.

Uzante la okazon la redakcio gratulas vin kaj deziras feliĉajn Kzistnaskajn Festojn, sanon kaj bonan humoron al ĉiuj!

Desegnaĵo de **Sneĵana Kononova**, [N.OMKA, Ruslando]

KOMENCANTO

2000 numero 7 / refondita en 1997/8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2001

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo: 78 рублей (за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el KOMENCANTO. Sola kondiĉo - nepre menci i KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loĝlokojn.

KOMENCANTO en PERSPEKTIVO

Proksimiĝas 2001 jaro. Ĉe la limo oni kutimas kalkuli rezultojn kaj anonci planojn. En 2000 jaro trioble kreskis la kvanto de niaj abonantoj tutmonde kaj la redakcio jam ricevis kelkajn leterojn kun petoj rakonti, kiel aperis KOMENCANTO. Tial ni decidis perspektive prezenti nian gazeton por ĉiuj interesiĝintoj.

La unua numero de "K" aperis fine de 1991. La titolo KOMENCANTO venis ne ŝajne. Mi (V.K.) dum longaj jaroj gvidis korespondan kurson de E-to. Por respondi al sufiĉe granda nombro da kursanoj pri la lingvo estis decidita eldoni revueton pri historio de Esperanto, pri la movado, pri la gramatikaj embarasoj, doni en ĝi amuzajn, korespondadresojn... Kursanoj estis komencantoj. Tiel naskiĝis la titolo de la gazeto - KOMENCANTO.

"K" vivis dum du jaroj, ekhavis ankaŭ eksterlandajn abonantojn, tamen komence de la 1994-a ni estis devigitaj bremsi la aferon (pro nova ekonomia politiko, mizeriĝo de la loĝantaro, galopanta inflacio ktp) kaj atendi pli favorajn tempojn.

Fine de 1997, kiam la la situacio iom stabiligis, ni denove eklaboris. La gazeto iĝis 8-paĝa kaj aperadis 8-fojojn jare.

La redakcio konsciis, ke perigojaĵo en la internacia lingvo devas esti internacia. Oni povas, kompare kun L.L.Zamenhof, diri: "Por la gazeto estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia". Tial ni klopodis disvastigi "K"-n tutmonde. Dum la 83-a Universala Kongreso en Francio, en 1998, la redaktoro portis ĉemizon kun titolo de "KOMENCANTO" kaj disdonis al ĉiuj nian gazeton.

Dum la tuta periodo de la ekzisto de "K" subtitolo de nia gazeto ŝanĝiĝis ekde "gazeto por korespondaj kursanoj kaj komencantaj esperantistoj" al "gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj", ĝis "gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj". El tio klare videblas niaj nunaj prioritatoj kaj celoj.

La ĉefa celo de KOMENCANTO estas aktivigi esperantistojn, novajn kaj spertajn, por praktika uzo de Esperanto. Ni donas eblecon por ajna esperantisto provi esprimi sin en la internacia lingvo kaj publikigas tiujn provojn. Kaj ofte okazas, ke tiuj provoj estas ĉarmaj kaj interesaj por multaj.

Dum pasintaj tri jaroj ni sukcesis malkovri kaj prezenti al esperantistaro kelkajn dekojn da novaj aŭtoroj, por kiuj jam ne sufiĉis 8 paĝoj, kaj ekde la fino de 1999 "K" iĝis 12-paĝa.

En la revuo vi renkontas ne nur literaturajn, sed ankaŭ pentroartajn provojn. Oni povas rimarki, ke en "K" abundas grafikaj desegnaĵoj kaj, kio gravas (!), ĉe ni pentras nur esperantistoj. La unuajn humurajn desegnaĵojn alsendis Bill Thorne el Londono. Hodiaŭ la gazeton beligas fajnaj pentraĵetoj de multaj aŭtoroj el la plej diversaj anguloj.

Tamen ni ne forgesas pri komencantaj esperantistoj. Redakcia temo en 1998 estis "E-to kaj periodaĵoj", en 1999-a - "E-to kaj turismo", en 2000-2001-aj - "E-to kaj literaturo". Tiel ni konatigas komencantojn kun E-mondo. Daŭre aperas korespondadresoj kaj diversaj anoncoj pri la movado.

Se rakonti pri la planoj por la nova jaro, ili estas jenaj:

- Ni intencas daŭrigi rubrikon "E-to kaj literaturo" kaj plu prezenti famajn E-verkistojn.

- Tute nova nia iniciato: rakonti pri tio, kiel niaj estimataj, tutmonde konataj esperantistoj, siatempe konatiĝis kun Esperanto kaj iĝis komencantoj. La redakcio jam ricevis tiujn rakontojn-rememorojn de *Kep Enderby*, prezidanto de UEA, *Lee Chong-Yeong*, eksprezidanto de UEA, *Istvan Ertl*, redaktoro de la revuo "Esperanto", *Sabira Stalberg*, redaktoro de "Kontakto", *Detlev Blanke*, eksredaktoro de "Der Esperantist", *Jak Le Puil*, eldonisto kaj redaktoro de "La Kancerkliniko" kaj multaj aliaj. Similon vi povos tralegi nur en KOMENCANTO!

- Ni planas reaperigi "gramatikan paĝon".

- Daŭre aperos amuzaj paĝoj kun anekdotoj kaj aforismoj, tiom ŝatataj de niaj legantoj.

- Kaj certe ni daŭre laboros por la ĉefa celo kaj espereble pli kaj pli da homoj el la tuta mondo ekvidos siajn nomojn sur la paĝoj de KOMENCANTO.

- En 2001 "K" restos 12-paĝa kaj aperos same 8 fojojn jare, tamen ni esperas atingi estonte 16-paĝan amplekson kaj tio antaŭ ĉio, dependas de la krea iniciatemo kaj kuraĝo de niaj legantoj.

Nia laboro por disvastigi "K"-n tutmonde, dank'al Dio, ne restis vana. Se en la 1998-a ni havis perantojn nur en 4 landoj, en la 1999-a - en 8, do ilia kvanto en la 2000-a jaro atingis la nombron 23! Nun oni legas "K"-n en pli ol 30 landoj. Multaj abonas "K"-n preter la perantoj rekte al nia UEA-konto, aŭ rekte al la redakcio.

Do, ni invitas vin, karaj amikoj, aboni nian gazeton, kontribui per iu ajn provoj por la enhavo kaj disvastigi "K"-n en viaj E-rondoj!

Redaktoro de KOMENCANTO
Viktor Kudrjavcev

Verkistoj de la 1-a literatura periodo

La spacon de niaj literatur-historiaj paĝoj ĉi-foje ni dediĉas al du rusaj aŭtoroj, kiuj vivis kaj verkis plejparte en la unua literatura periodo. Ili estas: originala novelisto Ivan Ŝirjaev kaj eldonisto kaj verkisto Aleksandr Saĥarov. Ambaŭ aŭtorojn kunigas simpla, natura, trafe karakteriza prezentmaniero de reala vivo en iliaj verkoj kaj bona, facile legebla stilo.

Ivan ŜIRJAEV

Ivan Ŝirjaev — ruso, naskiĝis 11 apr. 1877 en Jaroslavlva gubernio; unue estis instruisto, de 1904 iĝis vilaĝa pastro en Vologda. Esperantistiĝis en 1895. Kunlaboris en multaj tiujaraj gazetoj: “L’Esperantiste”, “La Ondo de Esperanto”, “Literatura mondo”, “La Lumo”, “Kataluna Esperantisto” kaj aliaj.

Multe laboris literature. : partoprenis diversajn literaturajn konkursojn (de “La Ondo de Esperanto”, “Internaciaj Floraj Ludoj” ktp), verkis originalajn novelojn kaj tradukis ampleksajn romanojn. Liaj noveloj estis kolektitaj en “Sep rakontoj” (1906) sub la pseŭdonimo “Ivan Malfeliĉulo”; “La ciganino” (1907), “Tra la loko ensorĉita” (1913), “Forta Impreso” (1914), “Peko kaj Kain” (1932). Pri la senduba talento kaj kapablo profunde analizi la realon atestas liaj originalaj verkoj.

I. Ŝirjaev ankaŭ multe tradukis, sed bedaŭrinde liaj gravaj tradukoj restis manuskriptaj: “Fratoj Karamazov” de F. Dostojevskij, “Milito kaj paco” de L. Tolstoj kaj aliaj.

Al Ŝirjaev apartenas ankaŭ granda iniciato de kreado de la “Enciklopedio de Esperanto”: dum kelkaj jaroj li mem kompilis pli ol 2000 artikolojn. Ĉi tiu lia laboraĵo estis la bazo, sur kiu poste estis konstruita la duvoluma verko.

Ivan Ŝirjaev mortis la 23-an de oktobro 1933. Interese, ke post lia morto pastro K.M. Kolobaŝkin tri foje okazigis diservojn en Esperanto je lia rememoro en la preĝejo.

Sube ni prezentas fragmenton el novelo de I. Ŝirjaev.

Ankoraŭ unu malagrabraĵo

Fine mi atingis la celon de mia longa veturado en glitveturilo. La ĉevaloj laĉaj, malfacile spirante, altrenis mian veturilon al la perono de granda duetaĝa lernejkonstruaĵo

vilaĝa, kies tri flankoj rigardis malafablan tombejon kun nigraj lignaj krucoj kaj nur la kvara estis turnita al al vojo. La vilaĝo estis tre malgranda; sur la strato estis vidanta neniun. Kun koro premata de doloro mi rigardis la vilaĝon.: rekte antaŭ mi staris preĝejo malgranda; dekstre, tri-kvar dometoj malnovaj kun malgrandaj kaj malpuraj fenestroj; maldekstre, grandega konstruaĵo grizkolora, pli simila al malliberejo ol al lernejo, kaj post ĝi longa, senfina vico da tombkrucoj.

— Kia abomena loko, diris mia veturigisto, alligante la ĉevalojn al ĉirkaŭbaraĵo. Mi kompatis vin, sinjoro.

Mia koro ekdoloris pli forte, ĉar mi jam antaŭvidis enuan unuton vivadon, kiu atendas min meze de tombkrucoj.

Sur la lerneja sojlo aperis alta figuro de lernejservisto; en sia mano li tenis lanternon kun enmetita resto da sebkandelo, kiu verŝas ĉirkaŭe lumon malfortan. Dum mi kun granda peno liberigis miajn piedojn el multpeza kovrilo ĉirkaŭŝutita de neĝflokaj, li longe rigardis min per siaj okuloj maljunaj, kaj, videble, vidis min malbone. Fine, li, kvazaŭ ion konsiderinte, starigis lanternon teren kaj ekkuris al mi.

— Ĉu vi estas instruisto? - li demandis, veninte. Kaj ankoraŭ ne ricevinte mian respondon, li daŭrigis: — Permesu al mi... jen mi helpos vin, sinjoro!... Ne klopodu, mi deportos viajn valizojn en la lernejon... mi ĉion ordigos...

— Ĉu vi, maljunulo, atendis min? ... Vi estas, videble, lernejservisto?

— Jes, sinjoro... Mi jam pensis, ke nia lernejo restos sen instruisto... Dudek jarojn mi servas jam ĉi tie; mi servis al dek du instruistoj... Volu iri post mi... jen ĉi tien, sinjoro!

...

Aleksandr SAĤAROV

Rusa pedagogo, eldonisto kaj entreprenisto Aleksandr Andrejeviĉ Saĥarov naskiĝis la 7an de aprilo 1865 en vilaĝeto Kudejĥa (Simbirskaja gubernio). En 1890 li finis la matematikan fakultaton de la Kazanja Universitato.

Saĥarov lasis post si manuskripton "Rememoroj de centprocenta esperantisto", (eldonita multe post lia morto en 1993 en Moskvo). Tiu ĉi brila aŭtobiografio legeblas kun granda intereso, kvazaŭ aventura romano. En ĝi li detale priskribas sian propran esperantiĝon.

Li, tiam sufiĉe grava ŝtata postenulo pri la brandaj akcizoj de la tuta gubernio konatiĝis kun E-to dank'al letero Sergej Polanskij en 1904, entuziasmiĝis pri la lingvo, propravole ekŝiĝis de la posteno, vendis la tutan havaĵon kaj anstataŭ trankvila perspektivo de kariera kresko kaj agrabla emeritiĝo li ĵetis sin al la tute nova, nekonata kaj eĉ riska afero de la internacia lingvo.

Je la propra mono li malfermis en Moskvo en 1907 librejon ESPERANTO, kie vendadis E-librojn surloke kaj perpoŝte tra la tuta lando. A. Saĥarov estis unu el pioniroj de koresponda instruado de E-to. Li multe propagandis Esperanton pere de gazetoj kaj ĵurnaloj tra la tuta Rusia Imperio. La librejo (kaj ties ŝildo kaj montrofenestroj) situis sur unu el la centraj stratoj de Moskvo, kio laŭ si mem estis bona reklamo de Esperanto. A. Saĥarov okazis sufiĉe bona komercisto, almenaŭ liaj e-komercoj ne donis malprofiton, sed male, la afero kreskis rapide, tiel ke li eĉ dungis helpanton en la librejon kontraŭ salajro.

"La Ondo de Esperanto" - iniciatita de Saĥarov tutlanda revuo, kiun li fondis kaj redaktis, estis ĉeforgano de Rusiaj esperantistoj en 1909-1917. Entute aperis 101 numeroj sur 1360 paĝoj kun 137 portretoj de konataj esperantistoj.

Dum kelkaj jaroj en la loĝejo de A. Saĥarov rifuĝis la Moskva E-Societo.

Al la plumo de Saĥarov apartenas kelkaj libroj "Sur vojo de kunfratiĝo" (artikoloj pri E-to, 1907), "Signifo de Akciaj societoj por E-movado" (1911), "Esperanta-rusa frazaro" (1915), pluraj lernolibroj kaj vortaroj por rusoj kaj "Esperanta krestomatio".

Lia partopreno en la 2-a kaj la 3-a Universalaj kongresoj kaj la propra sperto de la laboro kun esperantistoj puŝis lin verki originalan novelon "Superforta ambicio" (Skizoj el esperantista vivo, originale verkita), kie li brile, humure kaj ironie priskribas la realan vivon kaj rilatojn inter tiamaj esperantistoj. La noveleto estas same aktuala hodiaŭ, kiam ofte personaj ambicioj malhelpas al la nia komuna afero.

La suba fragmento montras, kiom brile A. Saĥarov regis la lingvon, malgraŭ tiama vortprovizo li bonege respiegulis diversajn vivajn situaciojn kaj detalojn.

Superforta ambicio

La kunveno estis malfermita de Telegrafov per malgranda parolado pri signifo por la homaro de unu komuna lingvo kaj pri strukturo de la lingvo Esperanto. Poste estis diskutate pri funkciado de la societo kaj elektita la Komitato. Ĝin konsistigis la doktoro kiel prezidanto, Paŭlo Petroviĉ kiel vicprezidanto, fraŭlino Martov kiel bibliotekistino, kaj ankoraŭ du membroj. Fine estis difinitaj tagoj por kursoj kaj babilkunvenoj.

Post la elekto de la Komitato Mario Viktorovna, renkontante siajn konatojn, ironie diris al ili:

— Gratulu min, nun mi estas edzino de la vicprezidanto. Ne vane mia edzo kaj Telegrafov klopodis pri la societo! Vi imagu: prezidanto kaj vicprezidanto!! Kvazaŭ en la franca respubliko!

Kiam ŝi estis revenanta kun la edzo hejmen, ŝi interalie diris al li:

— Kiom Nikolao Adamoviĉ (Telegrafov- la red.) ŝatas estri: dum la kunveno li ĉiujn komandis kiel ŝaksoldatojn; vi devas danki lin, ke li bonvolis donaci al vi la vicprezidantan rangon.

Responde Paŭlo Petroviĉ ion balbutis. El tio la edzino komprenis, ke ŝi ekpalpis malfortan kordeton ĉe la edzo.

La sekvintajn semajnojn Paŭlo Petroviĉ preskaŭ ĉiun vesperon paŝigis ekster sia hejmo: jen vizitis la babilkunvenojn, jen gvidis la kursojn, jen partoprenis la kunsidojn de la Komitato. Tio tre kolerigis Marion Viktorovna; ŝi multfoje riproĉis la edzon kaj plendis pri lia konduto al siaj konatoj. Sed nenio helpis. La plendoj donis nur pliajn motivojn al diversaj moketoj kaj ŝercoj.

Unufoje ŝin renkontis sur strato juĝa esploristo, tre malica ŝerculo kaj mokulo. Informiĝinte pri farto de Paŭlo Petroviĉ, li ironie diris:

— Mi aŭdis, ke via edzo tre interesiĝas per la esperantaj kursoj kaj mem instruas al Esperanto la fraŭlinojn Martov kaj Supov. Kaj post la lecionoj li kun plezuro akompanas ilin hejmen. Ĉu tio estas vera?

— Ho, kia li estas perfidulo! Mi devas observi lin, - kvazaŭ ŝerce respondis al li Mario Viktorovna, sed ŝia tremanta voĉo montris ŝiajn verajn sentojn.



Bill Thorne, [LONDONO, Britio]

Ann-Louise Åkerlund [HELSINGBORG, Svedio]

SVEDAĴ

Kristnasko



La kvar semajnoj de Advento komencas la celebrazon de Kristnasko. En la fenestroj de hejmoj, oficejoj, mal-sanulejoj kaj multaj aliaj lokoj oni metas elektrajn kandelabrojn kaj stelojn, oni ornamas la stratojn per lumgirdoj, kaj en placoj kaj kortoj oni starigas lumornamitajn abiojn. Dum la periodo okazas granda nombro de koncertoj kun bone konata kaj tre ŝatata muziko, gajaj festkantoj kaj solenaj himnoj.

La unuan dimanĉon de Advento en ĉiu urbo oni aranĝas festenon sur la stratoj. La infanoj povas renkonti la kristnaskan *kabadon* (la jul'avon, sanktan Nikolao) kaj ricevi donacon (se la gepatroj pagas). La kreskuloj povas trinki spicvinon kaj aĉeti lotojn el tomboloj. Ĥoroj kaj grupoj kantas ie kaj tie, kaj la butikistoj kiel eble plej bele aranĝas siajn montrofenestrojn.



Luĉia-festo

La plej grava festeno antaŭ Kristnasko estas la LUĈIA-festeno. La tago de Sankta Luĉia estas la 13-an de decembro, kiu laŭ la malnova kalendaro estas la plej mallonga kaj malluma tago de la jaro.

Infanoj kaj gejunuloj portas blankajn vestaĵojn kaj en la manoj - kandelojn. Unu el la knabinoj estas elektita Luĉia kaj portas kandelkronon. Ŝin sekvas kantantaj junulinoj kaj steloj, knaboj kun konusa paperĉapo kun steloj. Ili kantas tradiciajn kantojn pri la reveno de la lumo al la malluma tero.

La 23-an de decembro multaj familioj kolektiĝas por ornamu la kristnaskan arbon. (Aliaj familioj jam frue pretigis la abion.) Tiam oni eble ankoraŭ kune produktas kristnaskajn ornamaĵojn el diverskolora, ora aŭ arĝenta papero.

TRADICIOJ

La donacoj estas disdonataj jam antaŭvesperon de Kristnasko. En multaj familioj patro aŭ alia familiano maskovestas sin kiel kristnaska koboldo, frapas la pordon kaj demandas per basa obtuza voĉo: "Ĉu troviĝas kelkaj bonaj infanoj ĉi-tie?" Kiam la koboldo foriris la familiano revenas kaj multe bedaŭras ke li, precize kiam la koboldo venis, iris por aĉeti gazeton. Sur la paketoj ofte troviĝas rimitaj versoj, kaj tiam oni devas diveni la enhavon antaŭ ol oni rajtas malpaki la donacon.



La tradiciaj manĝaĵoj tre gravas. Ili multe baziĝas sur la porko. Antaŭe, kiam la plejparto de la sveda popolo loĝis en la kamparo, ĉiu bieno bredis porkon por kristnasko, kaj oni uzis ĉiun parton de la besto. Sur la kristnaskan manĝotablon oni metas ŝinkojn kaj kolbasojn, viandobuletojn, pasteĉojn, galantinon, rostitan porkoripaĵon kaj eĉ kuiritajn porkajn piedojn. La ŝinkbuljonon oni uzas por speciala manĝaĵo, kiam oni trempas panon en la buljonon. Kutime oni uzas brunan molan panon, bakitan kun biermosto, sed en norda Svedio oni trempas tre maldikan, malmolan, blankecan panon faritan en hordeo.

Post - kaj inter - la manĝoj oni frandas fruktojn, daktilojn, nuksojn, kaj multajn specojn de dolĉaĵoj. Cetere oni trinkas bieron, brandon kaj spicvinon. Oni facile povas kompreni, ke multaj homoj fine venas al la malsanulejo.

Sur la tablo oni ankaŭ metas diversajn specojn de marinitaj haringoj, krudspicitan aŭ fumaĵitan salmon, kaj en la suda Svedio fumaĵitan angilon. Lesiva gado ankaŭ apartenas al la kristnaska manĝotablo same kiel rizokaĉo. La rizokaĉon oni tamen povas manĝi je alia tempo. Kelkfoje migdalo estas kaŝita en la kaĉo kaj oni diras ke tiu, kiu ricevas la migdalon edziĝos venontan jaron.

LUL'AVO — *Jul* - nomo de antikva pagana festo en Nord-Eŭropo, poste anstatatigita per Kristnasko, kaj sekve ofte uzata en tiuj landoj por ĉi-tiu festo: *jul'arbo*

TOMBOLO — speco de societa loterio

LESIVA GADO — sekigita, nesalumita fiŝo (moruo, eglefino, brosmo, molvo) trempita en solvaĵo de sodo kaj poste kuirita.

SPICVINO — varmega vino kun sukero, zingibro, canamo, kardamomo, kariofilo kaj sekigita ŝelo de bigarado.

GALANTINO — malvarma manĝaĵo, farita el pecetigita kuirita porka aŭ kokida viando garnita per sia propra gelanteca suko.

ANGILO — serpentosimila manĝebla riverfiŝo kun muka, skvama haŭto; ĝia Atlantika specio vivas en Amerikaj kaj Eŭropaj riveroj.



Esperantigis **Carmen Llapart**
[FIGUERAS, Hispanio]

La tri anasidoj

infana fabelo

La lupo sciis, ke en la blanka dometo de la proksima arbaro loĝas tri belaj anasidoj, grasaj, pretaj por manĝi. Jam salivon havis ĝi en la buŝo.

— Mi estas ruza, do, facile mi manĝos la triopon.

— Amiko, tio ne estas facile, respondis la saĝa Otuso, kiu aŭskultis lin. La anasidoj estas diskretaj kaj konfidas al neniu.

— Vi vidos, - respondis la lupo. - Kun ruzaĵoj rapide mi kaptos ilin.

La morgaŭan tagon la lupo, vestita kiel maljunulino kun freŝa salato en korbo, vokis ĉe la pordo:

— Malfermu! Mi estas la najbarino kun salato.

Neniu respondis. Pli firme la lupo frapadis, sed vane. Laca pro atendado la lupo foriris..

Alian tgon, la lupo venis vestita kiel junulino kun ujo de vermiĉelo.

— Tam! Tam-m!! - denove frapadis la lupo. — Malfermu! Mi estas Enriketa kun vermiĉelo.

Sed la pordo ne malfermiĝis.

— Eble la anasidoj ne bone aŭdas, - pensis la lupo. - Sed ne gravas. Kun forto kaj ruzo mi kaptos ilin.



La lupo supreniris al la tegmento por rigardi tra la kameno. Sed surprizo! Alia lupo estis malsupre! Ĝi estas reflektita en la akvo de kaldrono preta por kuiri la tagmanĝon.

Pensante, ke alia lupo pli frue formanĝos "la proprajn" anasidojn, sen plu atendi, nia lupo sin ĵetas tra la kameno, falinte en la varmegan akvön.

Granda inundo okazis en la kuirejo. La tri timemaj anasidoj grupiĝis en anguleto. Kiam ili konstatis, ke la lupo nemoveblas, metis ĝin eksteren.

Post kelkaj tagoj preteriris ĉasisto. Vidante la belan felon, ekdeziris ĝin aĉeti. Li proponis al la anasidoj 20 monerojn. Ĉar ili nenion aŭdis - neis per la kapoj.

— Mi pagos 30. - La anasidoj daŭrigis la neadon.

— Mi donas 50, nek centimo plu, diris la ĉasisto. Sen atendi respondon, li metis sur la tablon 50 monerojn kaj foriris kun la lupa felo.

La tri anasidoj tre miris pro tiom da mono. Neniam ili vidis tiom da mono kune. Ili komencas diskuti: kion fari, kion aĉeti!? Finfine ili decidis iri al la konfitejo por aĉeti kukon de kremo kaj ĉokoladon.


Ili invitis ĉiujn amikojn kaj parencojn de la arbaro: birdojn, anserojn, kokojn, kokinojn, porkojn...

Ili multe amuziĝis. La festego daŭris ĝis la aŭroro. Ankoraŭ nun en la arbaro ĉiuj rememoras la karnavalon kun la tri anasidoj.

Pentris sur la paĝo **Snejana Kononova**
[NIJNJAA OMKA, Ruslando]

Originale verkita **Ginette MARTIN**
[SAULXURWES SUR MOSELOTTE, Francio]

Ĉu la krespo povas flosi ?



Sabate, mi kutime kuiras krespojn por vespermanĝo.

Sed mi faras pli da pasto ol estas bezonata — kiam neniu plu volas da ili, kaj se restas pasto, mi kuiras ĝin. Sed kion fari pri la troaj krespoj? Plezure mi manĝas ĝin por mia matenmanĝo. Sed kion fari por retrovi ĝin tute freŝa kaj ne seka? Genia ideo venis iam en mian cerbon.

Mi metis la troan krespon inter du telerojn, unu flanko de la krespo tuŝas la kavan flankon de la suba telero, la alian flankon de la krespo premas la dorso de la supra telero — Sukcesa ideo...

Iun tagon, kuzo kun lia edzino manĝis ĉe mi krespojn. Kiel kutime, mi metis la troan krespon inter du telerojn. Ĉu tiu krespo povis havi alian sorton ol eniri mian stomakon? Kial mi retrovis ĝin flosanta en malpura sapa akvo? Kiu povis prognozi por ĝi banon kaj naĝadon?

Unue: Mia kuzo, kiu neniam lavas manĝilaron, ĉi tiun tagon deziris fari tion.

Due: Li trovis pli simple meti ĉiujn telerojn en la lav-kuvon en granda vertikala viĉo, sen rigardi ĉu restis iom da manĝaĵo inter ili.

Trie: Li diligente lavas sen timo kaj vidas subite la krespon, kiu rapidas al surfaco kaj provas naĝi, kvazaŭ vivanta meduzo. Li ridas kaj ekkrias pro surprizo, kaj mi ve-krias:

“Krimulo, krimulo, mia bona krespo!! Ĝi ne plu estas manĝebla!!”

Tiun tagon, mi ne havis plezuron manĝi ĝin, sed mi havis la plezuron aŭdi la ridojn de la tuta familio, kaj tio konsolis min.

Sendis al la redakcio
Rudolf Zoldoš
[KANJIZA, Jugoslavio]

*el la vivo de soldatoj
kaj generaloj*

Nur mallonge...

Al generalo oni komandis novan soldatserviston. La altranga oficiro komandvoĉe instruis lin:

— Ĉiam mallonge, akurate! Mi ne ŝatas multe babili. Kiam mi diros: “Ellitiĝo!” - vi komprenu, ke mi bezonas akvon por lavi min, sapon kaj razilon por razi min kaj la uniformon por vesti min. Nur mallonge! Ĉu vi komprenas ?

— Jes, mi komprenas.

Iun tagon la generalo longe dormis kaj kiam lia soldato vekis lin, li duondorme diris al li:

— Mi malsanas.

— Jes, mi komprenas, sinjoro generalo, vi malsanas.

Kaj li rapide forlasis la ĉambron. Post duonhoro li revenis kaj raportis al la generalo, kiu jam sidis ĉe la tablo kaj bonapetite matenmanĝis:

— En la antaŭĉambro atendas la kuracisto, pastro, tomboficisto kaj viro de la enteriga entrepreno...




Yonler Cables Solis
[HOLGUIN, Kubo]

Kioma estas sumo?

la
numera
vizaĝo



la
kok'
sumo ?



Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?

Diferencas laŭ formo kaj enhavo reeĥoj de niaj legantoj al tiu filozofa temo, anoncita de la redakcio ĉi-jare. Estis aforismoj, proverboj, noveletoj, desegnaĵoj...

Ĉi-foje ni publikigas pensojn pri la temo de Bill Thorne, kaj tradukon de la klasikulo de hindia literaturo Rabindranath Tagor, sendita el Francio de Ginette Martin. La redakcio invitas la legantojn plu provi en ĉiu ajn formo respondi je tiu filozofa demando.

Bill Thorne [LONDONO, Britio]

Pensoj pri la temo...

KUN MULTAJ

BONDEZIROJ..!

Tempo kuras. Vi demandas ke mi pripensu la temon de la diferenco inter feliĉo kaj riĉeco. Mi pensis kaj pensis, sed ĝis nun mi nek feliĉas nek riĉas. Sed mi daŭros esplori la ideon..


Mi ne povas kompreni kiel la malriĉuloj, ekzemple en Afriko, ne faras ion por plibonigi ilian propran manieron de vivo. Ili vidas alilandajn metodojn por provizi trinkeblan akvon. Ili spertas la stultecon de senĉesa milito. Ŝajnas ke ilia sola plezuro estas sekso, kiu rezultas en tro da infanoj kaj malsanoj.

Do, ĉu la sekreto de feliĉo restas en saĝeco? Ne en imponaj vortoj, sed en agoj, fabrikantaj kaj konstruantaj aferoj por ĉiuj...

kun multaj bondeziroj ĉiam via Bill Thorne



Jurij Perevalov [LESNOJ, Ruslando]



Rabindranath Tagore

Esperantigis el la franca **Ginette MARTIN**
[SAULXURWES SUR MOSELOTTE, Francio]

Doni

Mi estis irinta almozpetante de pordo al pordo, sur la vilaĝa vojo, kiam via ora ĉaro aperis malproksime, simile al belega revo, kiam mi admiris, kia estas tiu reĝo de ĉiuj reĝoj. Miaj esperoj pligrandiĝis, kiam mi pensis: "Finitaj por mi la malbonaj tagoj" Kaj mi jam prepariĝis, atendante spontanajn almozojn kaj riĉaĵojn ĉie disjetitajn en la polvon.

La ĉaro haltis ĉe la loko, kie mi estis. Via rigardo falis sur min, kaj vi elveturiĝis kun rideto. Mi sentis, ke la ŝanco de mia vivo estis venanta — Tiam subite vi antaŭten metis la dekstran manon kaj diris:

"Kion vi havas por doni al mi?"

"Ha! Kia reĝa ludo estas tio, etendi la manon kaj ĉe la almozpetanto almozpeti?"

Mi estis konfuzita, kaj estis embarasita. Finfine, el mia sakaĉo, mi malrapide tiris etetan grajnon de tritiko, kaj mi donis ĝin al vi. Sed kiom granda estis mia surprizo, kiam, taĉfine, malplenigante mian sakon sur la teron, mi trovis etetan grajnon de oro inter la amaso de mizeraj grajnoj. Mi amare ploris, kaj pensis:

"Kiam mi ne havis koron por doni ĉion?"



Bill Thorne
[LONDONO, Britio]

EKSKURSO

Unu familio decidis ekskursi al Francio, ĉar ili neniam estis tie.

Post la vojaĝo ili venis en Parizon kaj eniris restoracion.

Aperis kelnero kiu demandis: "Bonjour, m'sieur-dame! Quelleque chose pour boire, ou pour mangĉer?"

Nu, Paĉjo jam ricevis modernan klorecon, do li nur povis respondi:

— Kion?

Panjo koleris pro tiom publika parado de malklereco. Ŝi riproĉis lin:

— Ĉu kompreneblas, ke kiam oni eniras restoracion, kelnero venas kaj demandas "Kion vi volas?" Ŝi daŭrigis: "Ni devos lerni la lingvon". Ŝajnis, ke la germana lingvo estus bona, do, dum la sekvintaj kvar jaroj la tuta familio diligente studis ĝin, la gepatroj kaj la du infanoj kunkune.

Unu tagon la Panjo anoncis: "Mi mendis belan ferion alilande".

— Bonege! Kien, kien? - ekkriis la infanoj.

— Mi volas, ke tio estu surprizo, - diris Panjo, — Sed la nomo de la lando komencas per "G"

— Ho! Germanio! Germanio! - ekkriis la infanoj.

— Fakte ne, - diris Panjo. — Estas Grekio.

*

Margarita Zujeva
[MOSKVO, Ruslando]

REKLANO

— Aĉetu cigaredojn! Perfekta tabako! Dank'al ĝi vi neniam maljuniĝos, neniam hundo vin mordos, neniam oni priŝtelos vian domon!

— Kial do neniam maljuniĝos?

— Ne ĝisvivos.

— Kaj hundo ne mordos?

— Tial ke vi ĉien iros kun bastono.

— Kaj ŝtelisto kial ne penetros la domon?

— La tutan nokton vi tusos, ŝtelisto forkuros.

— Kiajn virinojn vi preferas: saĝajn aŭ belajn?

— Nek tiajn, nek aliajn, vi ja scias, ke mi amas nur vin.

— Doktoro, mi kun la edzino seninterrompe kverelas. Helpu!

— Mia konsilo: pli multe kuru. Ne pli malmulte ol 10 km dum unu tago. Vi ekvidos — tio helpos. Post 10 tagoj telefonu al mi — vi min dankos.

— Doktoro!, - telefonas la viro post 10 tagoj. Vi estas prava. Ni ne plu kverelas!

— Jen, vidu, kurado fortigas nervojn.

— Kiaj nervoj, doktoro! Simple mi nun estas je 100 kilometroj for de la hejmo!

— Doktoro. Antaŭ miaj okuloj konstante ĉeestas iaj nigraj punktoj.

— Bone, mi rekomendas al vi okulvitron.

— Doktoro, vi estas miraklisto! Nun mi *vidas* ĉi tiujn punktojn!



KRISTNASKE, MI KISAS SUB VISKON.

Bill Thorne
[LONDONO, Britio]

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Pagintaj abonantoj de "K" - senpage

Lena Timofejeva
studentino, vigla interesa
junulino, scias la francan.
Bluhera, 5-31
PERM
RU-614081
RUSLANDO

s-ro Michel Averous
66 ja., pentristo, muziko,
vojaĝado, familiaj vizitoj
2 rue Berlioz
Jaucla, FR-09100
SAIN JEAN DE FALGA
Pamiers
FRANCIO

s-ino *Madeleine Guillou*
instruistino, korespondi
kun bonaj esperantistoj
Chemin du Terron,
Kerity, FR-22500
PAIMPOL
FRANCIO

s-ro *Robin Velazquez*
19 ja., tutmonde pri
kulturo, lingvoj, sporto
P.O.Box 555,
HOLGUINO,
CP-80100
KUBO

Fervojistoj de Ruslando !

Mi petas reĥi ĉiujn
fervojistojn-esperantistojn
de Ruslando por krei
Ruslandan Fervojistan
Grupon ĉe REU aŭ UES.
En IFEF (Internacia
Fervojista Esperanto-
Federacio) bedaŭrinde
forestas Ruslanda
fervojista Asocio
Pahomov Sergeo
p.k. 1392, KIROV
610904
RUSLANDO

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Via abono por via kaj nia bono!

s-ino *Mirka Asherova*
amika korespondado,
telefonkartoj, vojaĝoj,
naturo
Josefodolska 121,
CZ-293 07
MLADA BOLESLAV
ĈEĤIO

s-ro *Jose Tarcisio*
De Lima
amika korespondado
Rua Rio Tocantins 1364
Jardim Iracema,
BR-60340-110
FORTALEZA-CE
BRAZILIO

Irina Naumoviĉ
16 jaroj, sporto, muziko,
korespondi tutmonde pri ĉiuj
temoj
Zaplnaja 39
TJUMENO
RU-625000
RUSLANDO

Japania
Esperanto
Korespondo
Servo
Ĉiam konstante
akceptas korespondo-
proponojn kun japanoj.
Skribu unuope al:

*Japania Esperanto-
Korespondo-Servo*
ĉe KLEG,
Sonehigasi
1-11-46-204
TOYONAKA-SI
561-0802
JAPANIO

Parolas Varsovio — Pola Radio Internacia ĉiutage

tempo (UTC)	08:30-09:00	13:30-14:00	18:00-18:30	19:00-19:30
frekvenco kHz	7380	7285; 7275	7145	7380

adreso por komputil-posedantoj kun plena alireblo al la reto:

<http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>

TTT-ejo: <http://www.radio.com.pl.polonia/>

2000 = KOMENCANTO = 2001
kostas same !

